

La plej granda aranĝo de la klubo estas ĉiujara Lingva Festivalo (la lasta marta sabato). La duan festivalan tagon la klubanoj pasigas en la Palaco de Libroj. Diversaj pridiskutataj temoj, diversaj okupoj, novaj kaj malnovaj geamikoj...



Ni ĝojas, kiam ni kunas.



Dum leciono (instruisto – Jurij Karcev). Temas pri homa korpo.

Oni pridiskutas multajn temojn dum lernado



Ĉina tea ceremonio




Iufoje oni spektas diversajn esperantlingvajn filmojn



En ŝakmondo

La Palaco de Libroj ĉiam atendas vin!

Aŭtoroj: Margarita Karceva, Oljga Gaŝneva



PALACO DE LIBROJ

URBA
ESPERANTO-KLUBO
100 JAROJ





En la centro de Uljanovsk troviĝas Uljanovska regiona scienca Lenin-biblioteko. Ĝi estas konata inter la urbanoj kiel Palaco de Libroj. Ĝi ekzistas dank' al iniciato de P.M.Jazykov, kiu ĝin fondis en 1848. Laŭ decido de simbirskanoj ĝi estis fondita memore al N.M.Karamzin. Por tiu celo al la biblioteko sendis siajn librojn lia vidvino, fratoj Jazykov, verkistoj I.A.Gonĉarov, S.T. Aksakov, D.V.Davydov k.a. Pli ol 400 volumojn transdonis la estonta caro Aleksandr la Tria. Vizitantoj de la biblioteko estis homoj el diversaj sociaj tavoloj. Publika Karamzin-biblioteko estis senpaga, tamen legantoj rajtis pruntepreni librojn kontraŭ kvin rubloj kiel garantio.

En la jaro 1924 oni decidis fondi Palacon de Libroj, kiu ricevis la plej belan urban konstruaĵon – domon de estinta Nobela kunveno (arkitekto I.Benzeman). Januare 1925 ĝi ricevis nomon de V.I.Lenin. La 26-an de aprilo 1990 oni malfermis ĉi tie muzeon „Publika Karamzin-biblioteko“. Ĝiaj ekspozicioj estas unikaj.

Multaj homoj utiligas ĝiajn servojn, konsultante la vere unikan materialon. Palaco de Libroj iĝis la centro por esplor-laboroj. Viva, funkcia biblioteko devas daŭre plenumi jenajn taskojn:

- konstante pliampleksigi la kolektendan materialon;
 - katalogi ĝin laŭalfabete kaj laŭteme;
 - konvene stoki kaj protekti ĝin kontraŭ perdoj;
 - disponigi ĝin al dezirantoj;
 - respondi dokumentadajn informpetojn;
 - malhelpi pereon de kaduka materialo per konservado;
 - fari esploran kaj publikigan laboron.
- Kaj ĉiujn ĉi taskojn nia Palaco plenumas.

Fremdlingva fako



Estrino de la fremdlingva fako Svetlana Dyrina rakontas pri eblecoj de la fako

Tiu fako ekzistas ekde la jaro 1925. Tio estas la sola fako en la tuta regiono, kiu posedas librojn pri ĉiuj sciencoj en pli ol 100 lingvoj. Ĉi tie funkcias legejo, lernolibra centro de Goethe-instituto, lingvistika salono kaj kelkaj kluboj. Ĝiaj servoj estas je via dispono.

Vi povas veni kaj studi surloke. Vi povas peti telefone aŭ skribe informojn pri la havaĵo de la biblioteko. Vi povas pruntepreni librojn el aliaj bibliotekoj, kiuj kunlaboras kun la teleprunta reto internacia. Kontraŭ pago vi ricevas fotokopiojn aŭ filmojn. Ĉi tie estas konservataj raraj libroj kaj revuoj en multaj lingvoj. Ĝi daŭrigas sian dokumentadan, kolekta kaj informan laboron ĝis hodiaŭ. Tiu fako estas pilgrimejo de studentaro kaj specialistoj pri lingvistiko.

En la fremdlingva fako funkcias kelkaj kluboj: lingvistika salono, klubo „Globuso“ kaj E-klubo. Ĝi posedas beletron kaj aliajn materialojn, ligitajn kun Esperanto. Ĉi tie estas aranĝataj senpagaj E-kursoj.



Ljudmila Rjazanova ĉiam pretas helpi

Esperanto-klubo



Konstanta ekspozicio de E-literaturo



Galina Martjanova helpis al ni en arkivoj

La unua mencio pri la Simbirskia Esperantista Societo estas datita la 31-an (18-an) de decembro 1909. Ĝi estis listigita en la registro de societoj kaj unuoj en la Simbirskia gubernio. Fondintoj de la Societo estis: direktoro de Karamzin-kolonio V.Koposov, kapitano V.Leparskij, liberpraktikanta kuracisto N.Portnjagin kaj instruisto de la franca lingvo de Simbirskia komerca lernejo F.Ĵanere.

En la jaro 2005 ĉi tie refondiĝis E-klubo, kiu aranĝas interesajn kunvenojn. La klubon vizitas gastoj el diversaj urboj: Moskvo, Ĉeboksari, Dimitrovgrad.

La nuna uljanovska Esperanto-klubo vivas viglan vivon.